# La kubaj sciencistoj raportas: vakcinaj kandidatoj por la vivo



**Kunsido kun la kubaj sciencistoj fronte al la Kovim-19**

Havano, mar 3 (RHK) La ?enerala direktoro de la Instituto Finlay, dro. Vicente Vérez raportis pri la evoluo de Soberana 02, unu el la vakcinaj kandidatoj evoluigitaj de la esploristoj de tiu ?i centro, kune kun kelkaj institucioj, kiuj en la unuaj tagoj de marto devos komenci la fazon III de klinikaj provoj en 44 000 personoj en ok municipoj de Havano.

Post plenumi la unuajn du fazojn, li raportis ke ?i evidentigis grandan efikecon kaj ne?tralizan respondon fronte al la kronviruso; "la rezultoj atingitaj estas tre bonaj".

Li taksis "tre kompleksa" la fazon III de la klinika provo de Soberana 02, en kiu oni bezonas pli altan nivelon de kunordigo, konsiderante la vastecon de la samplo studota.

La fakulo anka? parolis pri la kandidato Soberana 01, kiu anka? "tre vivas". ?ia respondo estis mirinda kaj same evidentigas sekurecon.

Post fini la fazon I de tiu ?i kandidato, oni komencos la validigon de la fazo II  kun 700 personoj en la a?oj inter 19 kaj 80.

Li informis ke la instituto evoluigas kvinan kandidaton vakcinan, nome, Soberana 01A, kun la celo redukti la riskojn kiuj povus aperi en pacientoj konvaleskantaj de la Kovim-19, se ili reinfekti?us.

Aliflanke, la drino. Marta Ayala Ávila, ?enerala direktorino de la centro de genetika in?enierado kaj bioteknologio (CIGB), precizigis pri la evoluo de la klinikaj provoj de Abdala kaj Mambisa, la du kandidatoj evoluigitaj en tiu ?i institucio.

?i raportis ke amba? atingis tre bonajn respondojn pri imuneco kaj anka? pri sekureco. Abadala devas fini la duan fazon ene de unu monato en la provinco Santiago de Kubo.

La fazo III devas eki ?i-monate en la ?efaj municipoj de Santiago de Kubo kaj Guantánamo, kaj inkluzivos 42 mil personojn.

Similaj rezultoj estas atingitaj de la alia kandidato Mambisa, kies apliko estas naza, kaj jam trapasis la unuan fazon de klinikaj provoj. ?ia uzo estas pritaksata anka? en konvaleskantaj personoj.

La sciencistoj esprimis sian dankon al la insula lo?antaro pro la fido esprimita kaj asertis ke ili certe ne seniluziigos la kuban popolon.

fonto: Granma

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/249430-la-kubaj-sciencistoj-raportas-vakcinaj-kandidatoj-por-la-vivo

Radio Habana Cuba